

August Heinrich Hoffmann,  
Abendlied

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nun vesper' fariĝas  
Ree tie ĉi,  
Paco subeniĝas  
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas  
Ĉe la roko sen  
Ĉeso kaj ĝi bruas  
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniŭ  
Ripozigas ĝin,  
Ne dormigas iu  
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,  
Estas ankaŭ vi.  
Donu, ho Sinjoro,  
Pacon vi al ĝi.

...

August Heinrich Hoffmann,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas  
ĉie en la rond',  
paco subeniĝas  
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas  
ĉe la roko jen,  
kaj ĝi daŭre bruas  
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu  
endormigas ĝin,  
sonoril' neniŭ  
je la tago-fin'.

Mia koro, tia  
estas ankaŭ vi!  
Pacon trovos mia  
koro nur en Di'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2012-11.*

*Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)*

*Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied\\_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en [http://www.lieder-archiv.de/abend\\_wird\\_es\\_wieder-notenblatt\\_300026.html](http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html), la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.*

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, \*1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2013-01-27.*

*Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)*

*La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.*